TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO.
2016-04-29, n-ro 424

tejo aktuale
La plej freŝaj novaĵoj el Esperantujo

# Muzika konkurso de Kontakto

**Post** du sukcesaj realigoj, Kontakto, la oficiala organo de TEJO, ĉi-jare kun apogo de TEJO kaj UEA denove okazigos la Muzikan Konkurson de Kontakto. La konkurso estis lanĉita en 2014, kun la celo plenigi la truon, kiun lasis la ĉesigo de la branĉo "Muziko" de la Belartaj Konkursoj de UEA en la mondo de E-muziko. La talentoj de niaj artistoj estos premiitaj en tri kategorioj: "Kanto de la jaro", "Premio de la publiko" kaj "Nova Talento". En 2014 partoprenis 16 konkursaĵoj, kaj en 2015 la konkurso allogis 14 artistojn. Se vi interesiĝas pri tiu oportuno atentigi la esperantistan publikon pri via muziko, bonvolu informiĝi pri detaloj en la retpaĝo de Kontakto: http://kontakto.tejo.org/.

La talentoj de niaj artistoj estos premiitaj en tri kategorioj: "Kanto de la jaro", "Premio de la publiko" kaj "Nova Talento". En 2014 partoprenis 16 konkursaĵoj, kaj en 2015 la konkurso allogis 14 artistojn. Se vi interesiĝas pri tiu oportuno atentigi la esperantistan publikon pri via muziko, bonvolu informiĝi pri detaloj en la retpaĝo de Kontakto: http://kontakto.tejo.org/.



## Volontula Domo por UEA — Bona Ideo!

La Estraro de UEA planas aĉeti plurĉambran loĝejon en Roterdamo por akcepti pli da volontuloj por la Centra Oficejo de UEA. Vi havas la ŝancon plurmaniere kontribui al tiu projekto, interalie per donacoj, unufojaj aŭ ĉiumonataj, aŭ lasante seninterezan krediton al UEA. Informiĝu pri la diversaj manieroj subteni tiun projekton ĉe: http://uea.org/asocio/volontuladomo.

---

## Nova kajero de la revuo Esperanto

La lastan numeron redaktitan de Fabrício Valle malfermas artikolo pri la temo “tradicio”. Valle adiaŭas al siaj legantoj per paradokso, prenita de citaĵo de rusa poeto: “Ankaŭ rompi la tradicion estas tradicio.” Plie allogas artikolo de Latifou Gbadamassi pri afrikaj lingvoj kaj pri iliaj rilatoj al Esperanto. En la rubriko “Dek Demandoj” gastas Francesco Maurelli. La entreprenisto klare analizas aktualajn temojn, interalie rilatajn al UEA, la E-Movado kaj la esperantista ekonomio. Provokan demandon starigas Wang Tianyi en sia artikolo “Ĉu Esperanto vere estas internacia lingvo?”. Opiniemuloj ĝuos krome la artikolojn “Ĉu la junularo maljuniĝas” de Fernando Maia Jr. kaj “UEA en la disvolvado de faka agado” de Fabrício Valle. Ensalutinte ĉe uea.org, vi povas elŝuti la numeron ĉe: http://uea.org/l/?prenu=eo_apr16.

---



# TEJO serĉas EVS-volontulon!

TEJO denove serĉas plentempan TEJO-volontulon, kiu dum unu jaro deĵoros en la Centra Oficejo de UEA. De tiu sperto profitus ne nur TEJO, al kies bonfarto vi kiel volontulo grave kontribuus, sed ankaŭ vi. La volontulo laboros en la koro de la E-movado kaj havos la ŝancon kunlabori pri gravaj projektoj, ekz. aranĝoj, informagadoj, kampanjoj kaj evoluigo de interretaj projektoj. Se vi loĝas en EU aŭ najbara lando, aĝas inter 18 kaj 30 jarojn kaj interesiĝas pri tiu oportuno, trovu detalajn priskribojn ĉe: http://tejo.org/2016/04/tejo-sercas-evs-volontulon-3/.

**Demisio de Stefano Keller**

La 22-an de aprilo Stefano Keller anoncis sian demision de la estrarposteno pri Eksteraj Rilatoj. Keller klarigis en sia demisia letero, ke la demisio okazis pro diversaj kialoj. Plie, li jam plenumis sian taskon pri la ĉi-jara raporto de la Estraro de UEA kaj ne ĉesos agadi por la afero de Esperanto, sed pluaktivos ekster la kadroj de la Estraro. La tutan demisian leteron bonvolu trovi ĉe “La Balta Ondo”: http://sezonoj.ru/2016/04/keller/.




**“La Ondo” ekaperis en elektroniklibra formo**

Ekde 2007 la redakcio de “La Ondo de Esperanto” proponas elektronikan abonon de la revuo en la formato pdf. Jam pli ol kvarono de la abonantoj preferas ricevi la revuon kiel pdf-dosieron. Tamen, pdf ne estas ideala formato por vidigo sur saĝtelefonoj kaj librolegiloj. Tial “La Ondo” decidis fari plian paŝon kaj proponi la revuon en epub, la plej populara elektroniklibra dosierformo. Por elprovi epub, vi povas elŝuti la martan numeron de la revuo ĉe ĝia kiosko. Por ricevi detalajn instruojn kiel ideale vidigi tiun formon per via aparato, legu la prian artikolon ĉe La Balta Ondo: http://sezonoj.ru/2016/04/ondo-9/.

# UK 2016: Partoprenu en la informada agado!

La Universala Kongreso de Esperanto okazos nur post tri monatoj, sed la informada agado jam ekruliĝis: En la urbocentro oni de nun trovas afiŝegon pri la kongreso en la slovaka kaj en Esperanto. La organiza teamo estas en bonaj kunlaboraj rilatoj kun la urbo Nita, tamen ankaŭ via helpo estas bezonata por perfektigi la eniron en novan

kongrescenton. Ekzemple, vi povus uzi la reklamrulbandojn disponeblajn en la kongresretpaĝa elŝutejo en viaj blogoj/retejoj. Partoprenu!



## Velado por Esperantistoj

Esperanto-renkontiĝoj ekzistas de ĉiuj specoj. Maloftaj kaj elstaraj tamen estas surŝipaj aranĝoj: Tian vi povos partopreni de la 1-a ĝis la 5-a de juli 2016, la “Veladon por Esperantistoj”. Ĝi estos organizata de la “Grupo Esperanto-Tigullio”, kiu anas en Itala Esperantista Federacio, kunlabore kun la vela asocio “Flaga Nodo”. Partoprenantoj povos admiri la pitoreskan marbordan regionon de Ligurio. Tiu aranĝo proponas la ŝancon renkonti esperantistojn ene de la nekutima emocia kadro de velkrozado. Vi estos en la spertaj manoj de longjara itala velisto, kiu krome parolas Esperanton. Pliajn detalojn trovu ĉe: http://www.nodobandiera.it/wp371/attivita/2016-2/velado-por-esperantistoj/

## Aliĝu al JES jam nun kaj ricevu senkostan drinkaĵon!

La 8-a Junulara Esperanto-Semajno okazos de la 28-a de Decembro ĝis la 4-a de Januaro 2017 en Waldheim am Brahmsee, Norda Germanio. Tiu dato unuarigarde ŝajnas ege for, sed se vi jam nun aliĝas al la aranĝo kaj estos inter la unuaj tridek aliĝintoj, vi ricevos senkostan drinkaĵon. La retpaĝo jam estis lanĉita kaj enhavas abundon da informoj pri la ejo, la programo kaj la kotizoj. Nepre informiĝu pri la detaloj ĉe: https://www.facebook.com/junularaesemajno/?fref=ts.

## Venontaj renkontiĝoj

**4 - 8. majo**

BARO (inkl. Ĉieliro, 5. majo) - en Bad Münder, inter Hannover kaj Hameln, Germanio. Multaj venas kun siaj infanoj. Ni babilas, ludas, festas, eluzas la eblojn de la granda herbejo kaj la rivereto kaj faras lignan fajron

**4 - 8. majo**

Printempa Esperanto-Kongreso - en Kultura Centro "La Marlagne", Namuro, Valonio (Belgio). La kongreso celas ĉiujn: infanoj, adoleskuloj, junuloj, plenkreskuloj, komencantoj, fluparolantoj... Inf.: Verdaj Skoltoj, ruelle de Thuin 20. BE-6540 Lobbes, Belgio. Rete:info@verdajskoltoj.net, tel.: +32 71 165 395 aŭ +32 485 517 552

**5 - 8. majo**

Franca kongreso - en Marsejlo, Francio. En tiu kongreso, kiu temas pri *Marsejlo, Pordo de Eŭromediteraneo*, vi povos partopreni la statutajn kunsidojn de Esperanto-France, kaj aliaj asocioj kiel GEE (Groupement des Enseignants Espérantophones), la Federacio Esperanto-Provence aŭ FKEA (Franca Katolika Esperanta Asocio). La programo enhavos prelegojn pri Esperanto kaj ĝia movado kaj pri multaj aliaj temoj rilatantaj al nia kongresa temo *Marsejlo, Pordo de Eŭromediteraneo*. Dum la kongreso, vi ankaŭ povos trapasi la ekzamenojn de FEI (Franca Esperanto-Instituto). Inf.: Esperanto France, Pierre Oliva, Eden Parc 99, 2772 Montée du Vieux Camp; FR-83330 Le Castellet, France.
Rete: kongreso2016@esperanto-france.org

**5 - 8. majo**

Sveda E-kongreso 2016 - en Gdansk, Pollando. El la programo: interkona vespero, vizitadoj al zoologia ĝardeno, E(ŭropa)-Centro de Soldarieco, E(speranto)-kverko, velŝipa ekskurso, ktp. Inf.: Triurba Esperantista Asocio TORENTO laŭ la reta adreso: torentosopot@wp.pl

**5 - 8. majo**

Interkultura Majrendevuo - en Vroclavo, Pollando. El la programo: urba kaj ŝipa promenado, koncerto, prelegoj, poliglota ligvokurso, kreado de hajko-poemoj. Inf.: Małgosia Komarnicka Centro de Interkultura Edukado - Vroclavo,
rete: informado.eo@gmail.com

**13. majo**

3-a Irana Esperanto-kongreso en Tehrano. La 12-an ni ekskursos al la subo de Damavad, la plej alta monto de Irano. Aliĝilo de IREK estas ĉikuna. Inf.: Keyhan Sayad pour ksayadpour@gmail.com

Germana Esperanto-Kongreso

**13 - 16. majo**

Germana Esperanto-Kongreso, GEK-2016 - Munkeno, Germanio. 93-a Germana E-Kongreso kaj 125-a jubileo de la Esperanto-Movado en Munkeno. Inf.: Karl Breuningerkongreso@esperanto-muenchen.de

**14 - 15. majo**

Printempa amikeca renkontiĝo esperanta - en urbo Ruse, Bulgario. Temo: Ĉu esperanto estas simpla, facila kaj vivanta lingvo? Inf.: Urba esperanta societo, Ruse, str. Pliska 36. Bulgario. Rete: grethe@abv.bg

**21 - 23. majo**

13-a MEKARO - Mez-kanada renkontiĝo de Esperanto – en Granby, Kebekio, Kanado. Amikeca turisma semajnfino. Okazas diversaj vizitoj, ekskursoj kaj komunaj manĝoj. La Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo) estas turisma semajnfino, kiu okazas ĉiujare, alterne en Kebekio kaj en Ontario, dum la longa semajnfino en majo, t.e. la semajnfino de la Tago Nacia de la Patriotoj en Kebekio kaj de la Viktorina Tago en Ontario. Ĝin organizas la Esperanto-Societo Kebekia kaj lokaj Esperanto-kluboj en Kebekio kaj Ontario. Inf.: Esperanto-Societo Kebekia, rete: Kontaktu nin




**21 - 28. majo**

Internacia Kongreso de Fervojistoj-Esperantistoj - IFEF - en Varna, Bulgario, apud la Nigra Maro! Postkongreso en Veliko Tarnovo. Inf.: inĝ. Veselka Kamburova (68-a IFK), z k Obelya-2, bl. 209/A/5, BG-1326 Sofio, Bulgario, rete: bg_68ifk@abv.bg, tel: +359-887090163

**25 - 28. majo**

AMO LIMA - en Les Brenets, Svislando. Aktivula maturigo por instruistoj kaj ne instruistoj. Gvidos ĝin K. Kováts, M. Molnár kaj M. Grosjean. Inf.: ILEI UEA, Mireille Grosjean, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. Rete: mirejo.mireille@gmail.com

**26 - 29. majo**

35-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso - en Łódź, Pollando. La kongreso estos pli turisma. En la unua tago ni partoprenos religian feston "Dia Korpo" en Łowicz, la sekva tago estos dediĉita al la urbo Zgierz kaj ĝia teksindustria historio. Sabate okazos ĝenerala kunveno de PEA-membroj. Dimanĉa mateno estos dediĉita al nova centro de Łódź. Inf.: Pola Esperanto-Asocio, Zarząd Główny, ul. Andersa 37 m. 59 a, PL-00-159 Warszawa, Pollando. Rete: estraro@esperanto.pl

**27 - 29. majo**

Renkontiĝo kaj konferenco de blindaj Esperantistoj - en Herzberg am Harz/Sieber, Germanio. Kunveno kaj faka konsultiĝo, spertointerŝanĝo de blindaj esperantistoj en la Esperanto-hotelo Zum Pass en Sieber, urboparto de Herzberg. Konatiĝo kun la Esperanto-urbo. inf.: Interkultura Centro Herzberg, klerigejo de GEA, DE-37412

Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, Germnaio. Rete: esperanto-zentrum@web.de

**27 - 29. majo**

50-an BOATADO - en Paluŝe, Litovio. Junulara Esperanto-klubo "Juneco" (urbo Vilno) organizas jam la 50an boatadon, kiu okazos en Paluŝe, situanta 5 km okcidenten de Ignalina, Ignalina distrikto en la Nacia parko de Aŭkŝtaitija. Aliĝo: bonvolu aliĝu laŭ ebleco pli frue, se eblas ĝis 1-a de majo:, sendante aliĝilon al Marijus rete: mardi@takas.lt: Nomo, familnomo, dato de naskiĝo, lando, urbo, e-poŝto

**27 - 30. majo**

9-a Esperanto-Kongreso de Nordorienta Ĉinio - en Habrino. Ĉinio. La kongresa temo estas: Per interreto disvastigi Esperanton. Diskutoj primovadaj, turismaj programoj, urbo- kaj muzeovizitadoj, pliaj postkongresaj aranĝoj. Inf.: LKK: Prof. Song Ping, Tel.: +86-13945690826, rete: songheshu@126.com

**28 - 29. majo**

Ĝenerala Asembleo de SES - en Hülftegg, (ZH, SG) Svislando. Ĝenerala Asembleo de SES kaj ennatura migrado. Inf.: Svisa Esperanto-Societo, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. Rete: mirejo.mireille@gmail.com

**29. majo**

4a Roma Festivaleto - en Frascati (Romo), Italio. Kunigo de la esperantistoj de Romo kaj proksimaj regionoj (10.30-17.30). Bonvenaj estas ĉiuj esperantistoj de la mondo. Inf.: Roma Esperanto-Centro, F.E.I., rete: esperanto.roma@esperanto.it

**29. majo**

Limburga biciklado - en Genk, Belgio. Limburga biciklado laŭ panoramoj kaj minea historio. Inf.: Limburga Esperanto-Asocio kaj BEMI, Genkerweg 70, BE-3690 Zutendaal, Belgio. Rete: vivantano@yahoo.fr

**31. majo - 11. junio**

Vizitu Rumanion de Karpatoj ĝis la Delto de Danubo kaj la Nigra Maro! en Braŝovo, Rumanio. 12-taga tradicia somera aranĝo en Rumanio, dum kiu oni povas malkovri diversajn regionojn de la lando, ek de la ĉefurbo Bukareŝto kaj Transilvanio, trapasante Karpatojn, ĝis la unika Delto de Danubo. Inf.: Rodica TODOR, B-dul Valea Cetăţii 22, bl. B 24, sc. A, RO-500289-Braşov, Romania.
Rete: rodica_todor@yahoo.com

Informiĝu pri pliaj renkontiĝoj ĉe: http://www.eventoj.hu

---

rigardu pli ĉe tejo.org

## Kolofono


TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO.

TEJO-aktuale estas senpage abonebla, aperas 2-semajnritme kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj. Por publikigi vian anoncon retmesaĝu al tejo-aktuale@tejo.org.

Oficiala retpaĝo de TEJO-aktuale: tejo.org/tejo-aktuale

Redaktoro: Jan Kozousek, Aŭstrio, jan.kozek@icloud.com

Eldonas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), http://www.tejo.org

Limdatoj por kontribuoj: dimanĉo antaŭ la apero

Retpoŝta abono: http://uea.org/via/retlistoj



This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>

*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands

mailchimp